SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 67, avenue Gambetta, Paris 20e
Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris : Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533, Kopenhago n-o 4 986, Paris n-o 1234 22. Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier ».

VOJOJ AL SUKCESIGO DE L'SAT -KONGRESO

Ĉiu vizitinto de niaj kongresoj portis kun si neforgeseblan impreson pri la alta valoro de esperanto k pri ĝia preskaŭ senmanka taŭgeco por la interkomuniko de pensoj. La debatoj ofte estis ardaj k pasiaj — esperanto fidele peris tiujn ĉi esprimojn de la homa naturo. En trankvilaj momentoj, esperanto same fidele ebligas objektivan, profundsencan diskuton. Esperanto kiel rimedo proponas siajn servojn al ĉiu.

Por ni laboruloj, homoj vivantaj sub ekspluatista reĝimo k luktantaj por nia emancipo el tiu ĉi senrajtiga jugo, esperanto havas nekalkuleblan valoron. Nur ĝi permesas verdire la tutmondan unuigon postulitan de ĉiuj praktikuloj de la klasbatalo, nur ĝi finfine efektivigas la ardajn dezirojn de ĉiu batalanto por libero k egalo, ĉar nur pere de nia lingvo ni povas, spite plej grandaj distancoj, interrilati kun niaj fratoj diverslandaj.

Sed ni devas eviti grandan danĝeron : Esperanto kiel neŭtrala rimedo, kiu ricevas sian valoron nur per la celo, por kiu ĝi estas uzata, povas eĉ kontraŭefiki la formiĝon de internacia batalfronto de ĉiuj ekspluatatoj, se nin ne gvidas taktplena k komprenema spirito. Ni memoras, ke multe da horoj k tagoj en niaj kongresoj estis foruzitaj per partitendencaj disputoj, kiuj, kvankam pruvante la elokventon de niaj K-doj, tamen ne rezultigis iun sanan progreson. Male, la abismo pliprofundiĝis k la opozicioj organize apartiĝis. En tiu epoko multaj entuziasmaj K-doj forlasis la movadon, vidinte perei la belan sonĝon pri la interfratiga misio de esperanto.

Tamen malprave ili agis !... La ideo de toleremo k komprenema diskutado pri la pensdiferencoj ne venkas sen persista luktado. Forlasante en tiu luktado la sampensantajn K-dojn, oni kontraŭagas al sia propra idealo.

Hodiaŭ tiuj ĉi pasiaj bataloj ne plu minacas niajn kongresojn. La vasta kadro de la kongresaj aranĝoj permesas al ni la organizadon de praktika peresperanta laboro. Ĝi permesos al ni en 1935 intime interkontaktiĝi kun la laborista movado francia k ebligos la aranĝon de kelktaga Laborista Altlernejo kun valoraj pristudotaj temoj.

Precipe la *faka* movado devos disvolviĝi en la kadro de la venonta kongreso. Kelkaj el la plej gravaj fakoj meritas specialan mencion : La *instruistaro*, kiu ĉiam multnombre estis reprezentita ĉe niaj kongresoj k kiu povas k devus ludi preferan rolon en nia movado ; la *fervojistoj*, kies profesio ilin favoras pro la reduktitaj veturkostoj k kiuj trovos en Parizo fekundan grundon por naskotaj interrilatoj ; la *liberpensuloj*, kiuj devus refortigi sian fakon precipe en la nuna momento, kiam ekleziuloj el ĉiuj nuancoj volas piedpremi la flameton de penslibero.

La *Laboristaj Esperanto-Asocioj* (LEA-oj) kunsidu kvazaŭ stabo de la Laborista Esperanto-Movado, por komune fiksi la strategian planon por la venonta jaro kune kun SAT. Plej intima kontakto inter tiuj ĉi organizoj nedubeble pligrandigos la ŝancojn de nia komuna lingva movado en la laborista sfero. Kritiko pri nia laboro, proponoj por la plibonigo devos abundi en la kongreso, por ke en harmonia kunlaboro la plej efikaj vojoj estu malkovrataj.

La krono de la kongresaj aranĝoj devus esti la *Laborista Altlernejo Esperantista*. Ĝi devus esti la ĉefa pruvo pri la taŭgeco de esperanto. Diverslingvanoj laboristaj, en viva sed tamen objektiva k laŭ-tema diskuto, pritraktu aktualajn problemojn de nia lingva movado k tiujn de la socio. Tiu Altlernejo ne nur respegulu la lingvan perfekton, sed ankaŭ la sendogman spiriton, kiun nia Asocio deziras kulturi. La unuaj provoj faritaj estis sukcesaj k kuraĝigaj. Ni daŭrigu sur tiu ĉi vojo, pliperfektigante la entreprenon per zorga preparado k firma volo al ĝia efektivigo.

Per tia bonkvalita laboro, for de senfrukta partieca disputado, ni altiros la seriozajn K-dojn, la seniluziigitajn amikojn k postlasos ĉe la Pariza laboristaro la impreson :

La SAT-kongresintoj estas veraj pioniroj de nova spirito !

H. P.

Balado de la taglaboristo

ATTILA Jozefo

Sur la dorso korbo knaras,
Ni la herbojn falĉi penas,
El la kol' ni brikojn faras,
Por grafin' ni veston tenas
Kaj el porko grason prenas,
Lardon rostas nur kelkfoje,
Kaj vespero se alvenas,
Ni pagiĝas, sed senĝoje.

Ni altmurojn vane faras,
Vane knedas argilneston,
Al la filo vitro baras
Sur la strat' la konstrukeston[1] *;*
Se filin' la pupoveston
Petas — ni ja teksas foje —
Ŝi ricevas ĉifon-reston.
Ni pagiĝas, sed senĝoje.

Apud kurrimen' ni staras,
Portas ni la feron, karbon,
Ni vagonojn, relojn faras,
Plantas ni la vivo-arbon
Kaj kolektas grenogarbon ;
Kion havas ni nur foje,
Oni ŝutas en la marojn.
Ni pagiĝas, sed senĝoje.

Terpom' nur kreskas post pioĉo !
Pen' nin ŝokas eĉ ne foje,
Ne tial la plor-plenda voĉo.
Ni pagiĝas, sed senĝoje.

El la hungara trad. F. ĈUTAK.

[1] Brikludiloj, kesteto plena de briketoj.

15-a Kongreso de SAT en Parizo

Adreso: 67, avenue Gambetta, Paris, 20.

3.-7. AŬGUSTO 1935

Dua Komuniko

KONGRESEJO. En la venonta komuniko aperos la adreso de la Kongresejo, kun Akceptejo en la sama loko. La K-doj klopodu alveni Parizon je sabato, la 3-a de aŭgusto, en kiu tago vespere estas antaŭvidita la Interkonatiĝa Vespero por tiuj, kiuj alvenos sufiĉe frue k ne estos tro ellacigitaj per la vojaĝo. La *Malferma Soleno* okazos antaŭvideble dimanĉon, la 4-an, *posttagmeze* (por lasi libera la vesperon je la dispono de la gastoj).

SIGELMARKOJ. Ĉi tiuj estas verŝajne jam haveblaj ĉe apero de ĉi tiu n-o. La prezo estas la sama kiel por tiuj de la lasta Kongreso, nome 5 *fr. fr. por* 100 *pecoj*. Ili estas dukoloraj k prezentas karakterizan bildon pri la Kongresurbo.

SUPERA LERNEJO. Ni jam parolis en la n-o 423 pri tiu ĉi nova laborist-esperantista entrepreno kun instrua karaktero, k ni ŝatus, ke la K-doj, kiuj deziras partopreni ĝin, jam nun skribu al ni, anoncante sian aliĝon. La *verŝajna* dato por tiu Somerlernejo estas la 23. julio ĝis 2. aŭgusto. Loko : en la pitoreska ĉirkaŭaĵo de Parizo. La fikso de la *definitiva* dato dependas de la libertempa komenco por instruistoj en Francio ; malgraŭ delongaj promesoj la ministraro ankoraŭ ne interkonsentis pri la komenca dato de la ferioj en la venonta somero (ĉar ni kalkulas pri granda partopreno al tiu Lernejo el geinstruistaj rondoj). *O.K.K.*

Komuniko de la Plenum-Komitato

PERSONA HELPO AL K-DOJ

Jam plurfoje ni ricevis plendojn kontraŭ anojn de SAT k de LEA-oj, eĉ kontraŭ aliajn esp-istojn, kiuj iris de unu SAT-rondo aŭ LEA-grupo al alia, de unu izola membro al alia k senmotive almozpetis senpagan gastigon k monsubtenon.

Ĉar ili ofte pravigas tiujn petojn per asertoj malfacile kontroleblaj (ekz-e per aserto, ke ili estas politikaj rifuĝintoj) k uzas la rekomendojn, kiujn *tro fidemaj* rondoj aŭ anoj konsentis al ili, multaj K-doj sentas sin kvazaŭ morale devigataj subteni ilin, k okazis, ke iuj inter tiuj profitemuloj el nia movado sukcesis tiele fari longajn vojaĝojn k vivi dum monatoj *k eĉ jaroj* dank'al la helpo de laboristaj k aliaj esp-istoj.

Tio estas tiom pli neakceptebla, ke ĝenerale tiuj *ekspluatantoj* faras eĉ neniun pozitivan laboron por nia movado. Kaj la rezulto de ilia vivsistemo estas, ke K-doj teditaj de ilia ekspluatado forlasis SAT, timas aperigi sian nomon de Peranto en la Jarlibro aŭ nun rifuzas sisteme helpon al ĉiuj, eĉ al K-doj, kiuj *efektive* bezonas k *meritas* ĝin.

Ni tial memorigas, ke ĉiuj SAT-anoj, vojaĝantaj pro personaj motivoj, rajtas peti la helpon de niaj perantoj k izolaj membroj, sed ke, tion farante, ili devas okazigi al tiuj K-doj neniujn elspezojn k malagrablaĵojn. Sekve, ili devas principe anonci perletere sian alvenon sufiĉe frue, por ke la koncernataj K-doj povu ĝustatempe prizorgi ilian loĝigon, k aldoni enlandajn poŝtmarkojn aŭ internacian respondkuponon por pagi la respondon. Ili devas entrepreni vojaĝojn nur laŭ sia pagkapablo k eviti ĉian ajn moralan kvazaŭdevigon al aliaj, ilin monsubteni.

Ellandigitoj, persekutatoj havigu al si *nepre* dokumentojn, ekz. atestojn de SAT-perantoj aŭ LEA-sekretarioj el la hejm-distrikto, por ke ni povu kontroli ilian veran situacion.

Fine, ĉar *ĉiuj* havas kiel devon, plej rapide k komplete ĉesigi la cititan ekspluatadon, k ni devas ankaŭ malfidi pri eventualaj trompoj de spionpolicistoj, ni petas, ke ĉiuj SAT-anoj principe rifuzu ĉian ajn helpon (interalie senpripensajn rekomendojn aŭ informojn), kiu ebligus al profitemuloj daŭrigi sian ekspluatadon de la servemo de nia anaro. La K-doj ricevantaj la viziton de esperantistoj, kiuj petas senpagan gastigon *sen la atesto de SAT-rondo pri ilia fidindo*, devas forsendi ilin. Se iu K-do (ekz-e ĵusrifuĝinto) ankoraŭ ne povis ricevi tiun ateston, la K-doj, kiuj unuaj gastigas lin, devas laŭeble kontroli la veran situacion de la koncerna K-do k sendi al ni eventuale raporton pri ĝi.

---

1. **Listo de kongres-aliĝintoj.**

1. Ulo, Germanio ; 2. A. M. Riswyk, Hillegersberg, Nederl. ; 3. Simon Jalade, Pézénas, Francio ; 4. Horace Walker, Leeds, Britio ; 5. L. Bannier, Paris ; 6. Willie Smith, Brierfield, Britio ; 7. Le Sidaner, Paris ; 8. A. G. Provost, Paris ; 9. Glodeau, Montreuil-Paris ; 10. K-dino Glodeau, Montreuil ; 11. N. Bartelmes, Paris ; 12. K-dino v. d. Heide k 13. K-dino H. A. Buis, Bussum, Nederl. ; 14. J. Wild, Schlieren-Zürich, Svisio ; 15. G. J. Worst, Hago, Nederl. ; 16. Noel, Le Hâvre, Francio ; 17. Joh. Figueras, San Esteban de Bas, Hisp. ; 18. J. Chiland, Paris ; 19. M. Leblanc, St. Quentin, Francio ; 20. R. de Man, Amsterdam.

La JARLIBRO 1935 estas nun finpretigata. Ĝi estos dissendata kun la februara n-ro de « S-ulo » al ĉiuj membroj, kiuj pagis jam la tuton aŭ parton de la nunjara kotizo.

Ĉu klaskonsciaj geesperantistoj?

Dum mia restado en eksterlando mi renkontiĝis kun multaj laboristaj geesperantistoj k havis okazon rigardi iliajn land-organizojn. Kion mi aŭdis k vidis, ŝajnas al mi sufiĉe interesa por la tutmonda esperantistaro.

Mi renkontis laboristajn geesperantistojn, kiuj estas organizitaj en « neŭtrala » klubo k laborista klubo, asertante, ke esperanto estas lingvo k ne havas iun ajn rilaton al politiko. Laŭ mia opinio, tio estas absolute malĝusta, ĉar esperanto ja estas vivanta lingvo, kiu estas uzata de homoj. Do, ĉiu individuo povas uzi ĝin por siaj celoj, bonaj aŭ malbonaj.

Ĉu eble ankoraŭ ekzistas geesperantistoj, kiuj ne rimarkis, kiom ofte la burĝaro uzis esperanton kontraŭ laboristaj ideoj ? Ankoraŭ ne pasis longa tempo, de kiam « Heroldo » laŭdis k defendis la naciismon en Germanio. La japana gazeto « Oomoto » laŭŝajne havas la taskon ne nur stultigi la homaron, sed ankaŭ glori la japanan imperiismon.

Kion faras la laborista esperantistaro ? Ĝi ne nur estas indiferenta al tiu kontraŭlaborista propagando, sed eĉ subtenas tiajn « neŭtralajn » organizojn. La senkulpigo por ilia ago estas : « Vi pravas, sed en nia lando la politikaj diferencoj ne estas tiom akraj, k pro tio ne estas grave, ĉu ni estas anoj de la burĝa klubo aŭ ne ».

Sed ĉu vi, karaj balanculoj, foje pripensis, ke la venko de la laboristaro ne dependas de unu sola lando ? Krome vi devas konsenti, ke ne ekzistas, nek ekzistis *neŭtralaj* organizoj, ĉar tiaokaze ili ne prizorgus politikan propagandon por Hitler k aliaj malamikoj. Ni povas konstati, ke la « neŭtralaj organizoj » forĵetas sian neŭtralon, kiam kontraŭlaborista registaro transprenas la regadon.

Kial laboristaj esperanto-organizoj ?

Verŝajne vi miras pri tiu ĉi demando, sed sciante, ke ne nur organizitaj laboristaj esperanto-membroj, sed eĉ iliaj funkciuloj apartenas al ambaŭ movadoj, ni estas rajtigitaj tiel demandi. Laboristajn esp. organizojn ni ja havas por disvastigi esp-on inter la laboristaro, por varbi novajn lab. esperantistojn k utiligi esp-on por laboristaj celoj. Se niaj gvidantoj ne volas uzi esp-on por laboristaj celoj, mi ne komprenas, kial ili havas specialan intereson varbi inter la laboristaro ? Ankaŭ pli efike por nia disvastiga laboro estus, se ni forlasus la « neŭtralan » movadon. Tio valoras speciale por laboristaj esp. funkciuloj !

Ofte ni ankaŭ trovas malbonan klaskonscion rilate la abonadon al esperantaj gazetoj k aĉetadon de

broŝuroj. Kial ni ne aĉetas laborist-tendencajn broŝurojn aŭ abonas al tiaj gazetoj ? En multaj laboristaj esp. familioj oni abonas neŭtralajn eldonaĵojn anstataŭ laboristajn. Kial ? Kelkfoje pro pli facila teksto en « neŭtralaj » gazetoj, k ofte pro nepensado. Sed ĉu tio estas senkulpigo por malbona agado ? Ne, Gek-doj, helpu skribi esperantajn artikolojn k ni uzu ilin por « La Lernanto », kiu estas laborista esperanto-gazeto !

Denove oni eldonis esperantan gazeton « La Juna Vivo », tre taŭgan por komencantoj, sed ĝi nur devas pli-aktivigi nin prilabori « La Lernanto »n, por ke ĝia enhavo fariĝu pli facilkomprenebla !

Tute ne temas ĉi tie pri timo, legi alitendencan gazeton, sed temas pri helpo al la laboristaro.

Aliulino.

LA VERO PRI LA RABITA SAT-MONO

Al K-doj, kies membreco ĉe SAT ne datiĝas de longa tempo, ofte mankas scio pri la okazintaĵoj, kiuj antaŭ kelkaj jaroj kondukis nian Asocion al la rando de la bankroto. La fakto, ke ĉiam k ĉiam denove IPE-anoj disvastigas mensogajn informojn pri tiu afero k eĉ inversas la rolojn tiel, ke SAT aperas kiel la uzurpulo (!) k la Centra Komitato de SEU[1] *kiel blanka ŝafido, devigas nin al la sekvanta, tre konciza, per multaj dokumentoj (kiujn ni tenas) konfirmita klarigo :*

Ĉe la 9-a SAT-Kongreso en Lajpcig (aŭg. 1929) la komunista frakcio atakis la gvidantojn de SAT (speciale K-don Lanti) pro « taktikaj k personaj krimoj » *(tiel laŭ la Protokolo !). Samjare en septembro Drezen (sekretario de CK de SEU), revenante el Lajpcig, raportis antaŭ la Moskvaj aktivuloj, ke SAT estas « flaveta » organizo k ke SEU devas akceli la estontan gvidadon k superecon je la tutmonda lab. esp-ista movado. Pro la tiamaj financaj dekretoj CK de SEU estis sole rajtigita transpagi monon eksterlanden, i.a. al SAT. Tuj post la malsukceso de la kom. frakcio akiri la gvidadon de SAT en Lajpcig, la monpagoj komencis plimalrapidiĝi k plimalgrandiĝi, dum la sovetia membraro k abonantaro al SAT-organoj, kiel ankaŭ libro-aĉetantoj daŭrigis kreski. Tiel en feb.* 1930 *nia kredito ĉe CK de SEU jam atingis tian sumon, ke la Direkcio de SAT decidis urĝe komisii al CK de SEU presigi en Moskvo librojn je nia kredito, por malpliigi la ŝuldon. La 29. aprilo 1930 la ŝuldo de CK de SEU estis pli ol 12 mil germ. mk. (ĉ. 75.000 fr. fr.). Tamen neniu libro presiĝis, k la komisio pri presigo de libroj estis ripetata, unu... du... trifoje. Fine de majo la Direkcio decidas ne plu akcepti novajn mendojn sen mono el Moskvo, sed plenumi la kurantajn abonojn. La 8. junio laŭdire CK de SEU ne plu rajtas transpagi monon al SAT ĝis oktobro samjare...*

Ĉe la 10-a Kongreso de SAT en Londono la opozicio (1/3 el la ĉeestantoj) atakas akre la gvidantojn de SAT k manovras pri akcepto de Moskvo kiel kongres-urbo (kvankam la ebloj por ĝia aranĝo en Moskvo ne ekzistis !! *Ja eĉ post la skismo, ĝis hodiaŭ, ankoraŭ ne okazis IPE-kongreso en Moskvo !). Tuj poste la ĉefoj de l'opozicio decidas en Moskvo eldoni propran organon (« Internaciisto ») k starigi propran eldonejon (« Ekrelo »). Fine, per helpo de la komunista presejo en Lajpcig, al kiu ni ŝuldis sumojn por la tie farita gazetpresado, ni ricevas komence de novembro* 1930 *el CK de SEU* 1.000 *mk. (*6.000 *fr. fr.) k ankaŭ la promeson, ke ekde januaro* 1931 *ĉiumonate* 1.000 *mk. povos esti sendataj... Tamen — tiun promeson* sekvis nenia plua pago, *k ankaŭ aperis* neniu *libro* per *la kredito de SAT !*

Ho jes, unu jaron poste, *mallonge antaŭ la Amsterdama SAT-Kongreso, k longan tempon post alvoko en « Internaciisto » pri* Bojkotado de ĉiuj SAT-organoj k -eldonaĵoj *aperis eldonaĵo « Eŭgeno Onegin » sub la marko de SAT ! Tamen SAT neniam povis disponi pri pli ol 22 ekzempleroj el la eldonkvanto de tiu libro k ĝia disvastigo okazis per la aparato de SEU k la skisma eldonejo « Ekrelo » en Lajpzig ! La marko « SAT » sur la libro sekve servis nur kiel manovro por trompi bonkredajn K-dojn pri la « bona volo » en Moskvo rilate tiean libropresigon por SAT.*

Oni notu, ke la Lajpciga presejo havis filion en Moskvo, al kiu facile eblus pagi la ŝuldatan sumon (nenia eksport-malhelpo ekzistis ja en tiu manipulo !). Sed CK de SEU ne eluzis tiun eblon, male, ĝi eldiris per la buŝo de pluraj IPE-anoj en nia Amsterdama kongreso, ke ili « ne volas, *ke estu pagata la mono » !*

Kiam nia Lajpciga presejo « Neudrag » certiĝis, ke ĝi ne plu povas esperi ricevi pagon el Moskvo por nia pressŝuldo, kiu tiam atingis 3.643.59 *mk. (proks.* 22.000 *fr. fr.), ĝi subite ekpostulis de ni la tujan pagon de la tuta sumo, sin turnante por ĝia akiro al la tribunalo. Fakte tiam SAT staris antaŭ la bankroto, k nur dank'al la monhelpo de kelkaj privataj K-doj, kiuj saltis en la breĉon k pruntis monon ĝis hodiaŭ ankoraŭ ne repagitan, la celo de la skismuloj en tiu* **momento ne estis atingita.**

En laŭstatute aranĝita referendumo pri fiddeklaro al la Plenumkomitato (nov. 1931*), kiun partoprenis* 50 % *el la aktiva membraro,* 877 *voĉdonis por k nur* 171 *kontraŭ la P.K.*

La monŝuldo de CK de SEU estas 12.431 *mk. (proks.* 75.000 *fr. fr.),* ne *enkalkulante la valoron de la en Moskvo retenita librostoko (niaj tieaj eldonaĵoj).*

Tiu ŝuldo rezultas el al sovetiaj esp-istoj liveritaj gazetoj, libroj, Jarlibro, ktp. dum la periodo de 1929/30, *en kiu la pagoj el Moskvo ĉiam pli k pli malaltiĝis, ĝis ili fine tute ĉesis.*

Ni petas la Gek-dojn bone mediti pri tiuj okazintaĵoj, k ni opinias, ke tiam ili tiros la saman konkludon kiel ni : Ekde sia naskiĝo IPE portas sur sia frunto la stampon de uzurpulo, k se oni juĝas laŭ la lastaj n-oj de « Sur Posteno », oni devas konfesi, ke ĝi fervore klopodas por gardi sian denaskan reputacion.

La Plenum-Komitato.

P.S. — Baldaŭ aperos la detaloj pri la Skismo kun ĉiuj dokumentoj en formo de broŝureto ĉe S.A.T.

[1] Sovetrespublikara Esp.-Unio.

POR ŜTOPI LA BREĈON

31. *listo*

J. Wild, Schlieren	2	sv. fk.
E. Wehrli, Morges...........	1.50	sv. fk.
H. Stay (2978), Bournemouth .	10	ŝil.
Max .Leblanc, St-Quentin	10	f. fr.
Iu el Germanio	12	f. fr.
van Dienst, Roterdamo	1	h. guld.
W. J. Eerdmans, Roterd.	1	h. guld.
v. d. Landen, Roterd.	1	h. guld.
Celed. Santos, Buenos-Aires .	0.50	peso

Kursgvidanta Praktiko

Sekve de la artikoleto aperinta en la decembra « S-ulo » sub tiu ĉi titolo, mi sentas min devigata konigi mian sperton, opinion k metodon rilate kursgvidadon, esperante, ke tio havos utilon por nia tuta legantaro. La kursgvida fako en nia movado ja estas tiel grava, ke ne superfluas pritrakti tion en nia gazeto.

K-do D. Bourguignon opinias, ke ni ne reliefigu nian starpunkton pri politiko en niaj kursoj, ĉar en tiuj kursoj partoprenas kelkfoje etburĝaj personoj. Al tiuj personoj ni ne rabu la eblon lerni esperanton.

Kompreneble, ni rabu al neniu la eblon lerni esperanton k la kursgvidanto agas bone, kiam li tute ne parolas pri parti-politiko.

Sed K-do D.B. celas, ke ni devas forsilenti nian favoron al la ĝenerala klasbatalo. Malgraŭ ke nia movado agnoskas la klasbatalon, K-do D.B. opinias, ke pli taŭgas tute forsilenti tion en la kursoj.

Tio fakte signifas, ke ni devas trompi la kursanojn, kiuj poste, kiam

ili aliĝas al nia Federacio, baldaŭ ekscios la trompon. Ĉar tio devas esti nia celo : *aligi ilin al nia movado.*

Feliĉe, la Nederlanda L.E.A. havas alian opinion. Kiam la kursanoj enrigardas la lernolibron, eldonitan de nia Federacio, tiam ili tuj konstatas per la klasbatala enhavo de tiu libro, kia estas la organizo, sub kies aŭspicioj la kurso okazas. Kaj por la estonto de nia movado estas bone, ke la t.n. etburĝaj kursanoj, kiuj sin sentas ĝenitaj per tiu politika direkto, kiel eble plej baldaŭ forlasas nin. Tamen ofte ankaŭ venas al niaj kursoj personoj, kiuj ja estas burĝaj pro deveno aŭ alia kaŭzo, sed kiuj pro nia ruĝeco ne forkuras. Jen personoj, kiujn la socialista movado bezonas. Se ni bone tralegas la frontpaĝan artikolon de la decembra « S-ulo », tiam ni ekkonas nian taskon.

Pri kursgvidado mi jam havas iom da sperto, k kun bedaŭro mi ĉiam konstatis, ke *miloj* da homoj komencas la studon de esperanto, dum nur *centoj* fariĝas esperantistoj. La nepersistemo de la kursanoj certe kulpas en tio, sed malbona kursgvidado estas ofte pli grava kaŭzo. En nia movado ofte jam nespertaj esperantistoj devas gvidi kursojn. Sed eĉ se la gvidanto estas bona esperantisto, tio ne signifas, ke li havas iom da pedagoga talento. Ofte la kursoj estas pezaj, monotonaj k tute ne interesaj. Dum du jaroj mi gvidas kursojn kun granda nombro da kursanoj k mi konstatis, ke la entuziasmo ĉe la lernantoj estas pli granda en ili ol en la pli intimaj kursoj, kiajn mi ankaŭ gvidis.

Kelkfoje oni volas kompari esperanto-kurson kun elementa lernejo. Tio estas tute absurda. Oni povas pli trafe kompari esp. kurson kun altlernejo. Ankaŭ tie la lernantoj *hejme* devas studi, fari la taskojn, dum la elementa lernejo mem estas la loko de la studado. *Kvanto* da kursanoj estas do malpli grava ĉe ni. La rezulto de la antaŭjara kurso el 100 personoj estis, ke 50 el ili aliĝis al la Federacio k inter tiuj jam estas multaj, kiuj pli malpli flue parolas. Tiun rezulton mi akiris per tio, ke mi ofte komune paroligis la kursanojn k de tempo al tempo alparolis ilin esperantlingve. La kursgvidantoj de pli malgrandaj kursoj juĝu mem pri tiu rezulto.

K-do D.B. skribis, ke kursgvidantoj en Roterdamo ne mankas. Tio estas novaĵo, kiu tiel miregigas min, ke mi ne kredis al miaj okuloj, legante ĝin. Jen fakto, kiel kelkaj inter ni subtaksas la kursgvidadon.

Mia konkludo do ne povas esti alia, ol ke estas pli bona unu granda kurso sub talenta gvidanto, ol pli da malgrandaj kursoj sub maltaŭga gvidado.

Bas Wels (17.668).

EL NIA LETERUJO

Ĉe la jarkomenco la leterportisto alportis al ni multajn skribaĵojn, el multaj landoj. Kiel ĉiam, kelkaj leteroj entenas notojn sufiĉe interesajn por konigi al nia legantaro, — notoj karakterizantaj la spiritostaton tie k alie inter nia anaro aŭ simple aludantaj pri tiaj aŭ aliaj sociaj k politikaj fenomenoj de nia tempo. Jen kelkaj ekstraktoj :

El Aŭstrio atingas nin du plendoj. Unu K-do skribas : « Ho, amataj esperantistoj ! kiel estas nun dezerte tie ĉi ! Mi nun estas preskaŭ senhejmulo, mi devas nomadi fakte, ĉar mi ricevas nenian subvencion. Pli frue oni povis migrante en Aŭstrio kunporti la necesajn librojn, ĉar regis preslibero. Hodiaŭ tio estas plej danĝera, ja neebla... Por esp-isto tamen ekzistas unu paliativo... SAT, k ĝi ankaŭ fakte estas mia spirita alkroĉilo, trankviliganta, k tial estus por ni aŭstriaj esp-istoj bato terura, se ankaŭ tiu ĉi dolormildiganta rimedo restus for... »

La dua, el Vieno, diras i.a. : « Kvankam mi estas ano de SAT pli ol 10 jarojn, nun pro cirkonstancoj facile diveneblaj mi devas eksiĝi, same ĉesigi la gazetabonojn... Ni ribeluloj travivas teruran tempon entute, k en terorlandoj speciale. Ni suferas sub — eble nur etaj, kompare kun la tuta, plena teroro — preskaŭ ĉiutagaj k ĉiumomente eblaj malagrablaĵoj, kiuj nin lacigas k mortige malesperigas... Mi estis arestita surstrate, k mi havis en poŝo eltranĉon el gazeto de antaŭ 2 jaroj (la gazeto eĉ nun leĝe ne estas malpermesita !), en kiu temis pri socialismo. Sekvis teno en arestejo, domtraserĉo, forpreno de broŝuroj, presaĵoj malnovaj, ktp. Nun mi estas registrita kiel danĝerulo k ricevas de tempo al tempo viziton « treege ŝatatan »... Esp. literaturon la polico ĝis nun ne tuŝis ĉe mi, sed tio povos okazi baldaŭ... Sufiĉe mi spertis k fariĝis seniluziulo, pesimisto, eĉ skeptikulo...

« Terura pozicio estas por ni rilate religion. En publika servo laboristoj k oficistoj senreligiaj devis realiĝi al eklezio, k ĉar regas katolikismo, do al tiu. Personoj, kiuj geedziĝis civile, devis jam delonge edziĝi laŭ religia rito, kompreneble post antaŭa reakcepto de religia dogmo, estante eksterekleziaj. La ŝtato ja nun estas tia, ke ateisto (eksterekleziulo) estas pro tiu sola fakto danĝerulo. Post devigo en la publikaj servoj realiĝi al eklezioj, multaj personoj laborantaj en nepublikaj servoj agis same, aŭ pro timo aŭ pro profitemo...

« Plorinde estas, kiam oni vidas la plenan senhelpecon kontraŭ ĉio tio. Mi devis pereigi parton de mia biblioteko, mia granda fiero, alian parton eble pereigos « ili ». Sed tamen, amikoj, kvankam mi ne plu povos legi SAT-eldonaĵojn de nun, tamen mi volas esperi, ke mi ĝisvivos la tempon, kiam mi denove libere povos konfesi mian koncepton k aboni mian ŝatatan amikon (plej bonan) « Sennaciulo »... »

* * *

K-do Aldvorth (18 876), parolas pri preparo de diktatora reĝimo en Britio : « ... En la brita aviado neniu filo de laboristo povas fariĝi piloto ; ĉi lastaj estas rekrutataj el la idaro de l'nobeloj aŭ posedanta klaso. Komandorajn postenojn ricevas nur altaj nobeloj. Same la sendstacioj de radio estas liveritaj plene al reakciuloj. La nova sendstacio en Drojtŭiĉo kapablas silentigi ĉiujn alilandajn staciojn por la angla popolo. Ne plu povas riceviĝi sovetiaj stacioj per longondo... La registaro donas 150.000 funtojn (angla mono) al la reĝa familio k 25.000 ft. al la princo Georgo sola, kiu antaŭ sia edziĝo ricevis 10.000 ft. ĉiujare, sed pro tio ke li prenis edzinon, bezonas pliigon je 15.000 ft. ĝis tuto de 25.000 ft., dum senlaborulo kun edzino devas sin nutri per 24 ŝilingoj semajne... »

Tra la Esperanta Gazetaro

La naciemo de laboristoj.

En nia frata organo de la Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj n-o 12 de decembro 34, K-do C. H., friso laŭ nacieco, prezentas siajn argumentojn, kial li ne povas esti ano de SAT. El tiu ĉi artikoleto evidentiĝas unu fojon plian la gravega idediferenco inter tiuj, kiuj volas konservi siajn morojn, siajn kutimojn, siajn naciajn karakterojn, k inter tiuj, kiuj, ekkoninte la burĝecan devenon de tiuj moroj k kutimoj, volas elimini ĉiujn efikojn de la regado fare de la estranta klaso : koncize, kiuj konscias pri la universaleco de la ekspluatadsistemo k deziras kontraŭstarigi al ĝi same universalecan emancipiĝon. La emancipiĝintaj proletoj ne vidas plu sencon en tiuj ĉi naciaj kutimoj k moroj, en la arbitraj landlimoj k do prave organiziĝas, post kiam la lingva problemo estas solvita, laŭ sennacieca organizformo.

Sed ankaŭ la religia sento ne permesas al la nomita K-do aniĝi al SAT, ĉar li ofte vidas esprimojn en niaj organoj, kiuj lin ŝokas. Estas ĉefe la tono, kiu lin ofendas, ĉar li ja komprenas, ke oni povas esti liberpensulo. — La kruda tono, kiam ĝi venas el profunda konvinko, estas pli bona ol la « unuflanke-aliflanke » de kompromisemaj demokratoj. Se proleto diras « La dio estas la monsako », tiam li estas proksima al la vero, ĉar « dio » k « patrio » estas pretekstoj de senreligiaj ekspluatistoj, por konfuzi la cerbojn de siaj viktimoj. La vera religia sento ne povas esti ŝokata per tia frazo.

En la sama numero troviĝis, kvazaŭ respondo, tre valora ĉefartikolo « Kun plena konvinko membro de SAT ».

Moderniĝo de Ĉinio.

« Nia Gazeto », la riĉenhava k plaĉe prezentita, paroligas — ĉinan pastron J.-B. Kao pri la moderniĝo de Ĉinio. La moderniĝo konsistas en tio, ke « la popolo estas mastro de la tuta nacio ; ĉio apartenas al ĝi ; eĉ la registaro devas

komplete dependi de la popolo, ĉar ĝi estas kreata k kontrolata de la popolo... Ĝi devas labori por la popolo k laŭ la volo de la popolo. » — Kompare kun tio ni citu la unuan paragrafon de la germana konstitucio : « La tuta ŝtatpotenco eliras de la popolo ». La demokrata trompo estas ja certe moderna.

« Oni kreas grandajn industriojn ; ... oni uzas la modernajn maŝinojn k la modernan teknikon por la fabrikado »... — de kanonoj. Kiel do la ĉinaj kapitalistoj povos vendi la grandskale faritajn varojn al la mizeriĝinta ĉina popolo ?

« Nun (la malnovaj) religioj estas en dekadenco... La nuna registaro praktikas nenian religion, sed ĝi donas kompletan liberecon al popolo por religiaj aferoj. » — Tio estas do fruktodona kampo por la katolika eklezio ! Sur la marĉa grundo de l'demokratismo k indiferento de la flanko de l'ŝtato, la laboro de la jezuitoj havas la plej bonajn ŝancojn.

La LEA-Gazetoj atestas la forton.

Enhavo k amplekso de gazeto ĉiam spegulas la forton de la movado. Inter la plej gravaj de la laboristaj LEA-gazetoj elstariĝas la Nederlanda k la Sveda Laborista Esperantisto, kiuj ambaŭ vere ĝojige evoluas k atestas pri la kreskanta movado. La reguleco en la aperado, la zorga redaktado k la plaĉa prezentado de la riĉa enhavo meritas apartan mencion. Donante tiel ekzemplon al aliaj amikaj LEA-oj, la svedaj k nederlandaj K-doj plenumas pioniran laboron. Kuraĝon k sukceson por la nova jaro !

H. P.

Por la esp. infanaro.

De kelkaj monatoj la *Ned. Federacio de Lab. Esperantistoj* eldonas propran infangazeton : « La Vojo », redaktatan parte en holanda, parte en esperanta lingvoj. (Monata, ciklostilita, sed prese eldonota, se la abonanta nombro kreskos ; Adm. adreso : James-Wattstr. 42-a, *Groningen*, Nederl. Prezo : 0.50 guld. jare). La rubrikoj por infankorespondado k esp. instruo (kurso) estas bone prezentitaj. Pli malfacile solviĝas la elekto de taŭga legmaterialo, interesa por infanoj k laŭ ilia spirito. Ni esperas, ke en venontaj n-oj la redaktoro, anstataŭ ekzalti la animojn por sanktuloj Martino k Nikolao, trovos okazon legendumi la belajn heroajn figurojn ĉu de famaj scienculoj, bonfarintoj de la homaro, ĉu de sindonaj laboristoj. Eĉ la historio de la moderna lab. movado ja liveras ekzemplojn pri heroismo, kiuj meritas esti prezentataj al niaj infanoj, sen ke oni bezonas fali de unu ekstremo (neŭtralismo favoranta al landaj tradicioj k moroj eĉ eklezi-devenaj) en la alian (eduko al politika dogmeco). Trovi la oran mezon estas la malfacila tasko de redaktoro de laborist-infana gazeto. Ni opinias, ke « La Vojo » solvos tiun problemon.

N. B.

Diskutejo

Ĉirkaŭ la Sovetia problemo.

Iom mirigite mi konstatis, ke la raporto pri la kunsido de l'*Sennaciista Frakcio* en Valencio vekis tiom da intereso *ekster* nia rondo. La tri K-doj, kiuj opiniis necese eldiri sian opinion pri tiu raporto, verŝajne konsentos, ke iliaj kritikoj ankaŭ necesigas miaflanke respondon. Por ke ĝi estu kiom eble plej mallonga, mi staros ĉe la vidpunkto, kiun montris K-do H. P. nome : *ĉu en Sovetio konstruiĝas socialismo* ?

Jam delonge tiu demando staris antaŭ mi insiste. Kaj nur antaŭ unu-du jaroj mi sukcesis, post longa, zorga k diversmaniera esplorado, akiri la firman konvinkon, ke en Sovetio stariĝas ne socialismo, sed ia novspeca socisistemo, per kiu la *simplaj laboristoj k kamparanoj* estas eĉ pli abomeninde ekspluatataj ol en demokratie regataj landoj kapitalistaj. Kiam estos permesate en la SAT-organoj paroli libere pri Sovetio, kiel oni faras pri aliaj landoj, tiam mi pretas liveri pruvojn pri mia supra aserto.

Evidente, en ĉi tiu mia respondo al kritikoj pri la S.F. ne povas temi pri rebato al la grandskala blufo, organizita de la Stalina burokrataro. Mi nur petas la kredemulojn, ke ili bonvolu ne samigi industriigon kun socialismo. Neniu ja neas, ke en Sovetio konstruiĝas grandaj fabrikoj, elektroproduktejoj ktp. Kaj cetere tio okazas per la helpo de maŝinoj k inĝenieroj venigitaj el kapitalistaj landoj ! Estas en tio nenio *esence* socialisma. Same kiel en kapitalistaj landoj, en Sovetio la laboristoj estas dungitoj, k la diferenco inter la diversaj iliaj salajroj estas pli granda ol ie ajn alie. La sovetia ŝtato prunteprenas monon enlande k eksterlande k pagas eĉ pli altan renton ol kutime faras kapitalistaj landoj. Loterioj estas organizataj, kio estis ĉiam konsiderata de socialistoj kiel trompa k malmorala. En sovetiaj fabrikoj ekzistas la popeca laborsistemo, kio certe estas la plej abomeninda elsuĉado de laborista energio. La plusvaloro, anstataŭ iri en la poŝojn de privataj kapitalistoj, servas por vivteni en pli malpli privilegiita stato grandnombran parazitan burokrataron. Jam formiĝas nova klaso — oni eĉ povus diri : *kasto* — da *gvidistoj*, kiuj havas bonajn vivkondiĉojn, dum la granda amaso duonmalsatas. Por ilustri per iu konkreta ekzemplo ĉi tiun lastan aserton, mi diru, ke senlaborulo kun edzino k infano vivas en Parizo per la subvencio pli bone ol en Moskvo per 300 rubloj monate. Nu, en Sovetio la granda plimulto da laboristoj enspezas nur 80-90-100 rublojn !...

Dirinte mian longe antaŭe pripensitan opinion pri la speco de « socialismo », kiu konstruiĝas en Stalinio, mi nur aldonos, kiom bedaŭrinde ŝajnas al mi la konstato, ke ankaŭ SAT-anoj bonakceptas tiom senkritike ĉion *oficialan*, kio venas el Stalinio. Se K-do Lonte, ekzemple, estus malpli kredema, li certe demandus al si, kial subite estas en Sovetio disvastigata la patriotismo, dum antaŭe tio ne estis farata ; kial Sovetio aliĝis al la *Ligo de Nacioj*, dum antaŭ ne tre longa tempo la Ĝeneva institucio estis de la tuta sovetia gazetaro k de ĉiuj kompartioj el la mondo kvalifikata : « rabista asocio de imperialistoj » ; kial pli k pli da burĝaj verkistoj k eĉ da dungitoj de grandkapitalistoj laŭdas la landon, kie la laboristoj ne rajtas striki, estas kvazaŭ katenitaj al la fabriko k bezonas pasporton por iri de urbo al urbo.

Anstataŭ entuziasmiĝi pro la fakto, ke *La Internacio* estas la oficiala himno de l'Stalina diktaroreco, K-do Lonte pli saĝe agus, se li ĉagreniĝus pro tia oficialeco mem. Jam faŝistaj muzikistaroj en Italio akceptis sovetiajn oficialulojn per la sonoj de tiu kanto, k tio, miaopinie, metis grandan makulon sur la kanton de l'Revoluciularo.

« Estrar' nin trompis artifike, —
« Por ni do — pac' ! por ĝi milit' !
« Rompinte la armeojn strike
« Ni lasu l'vicojn sen hezit '. »

Ho ve ! La trompo daŭras. La kredemo ŝajne estas ne elradikiĝebla. Ankaŭ *La Marseljezo* iam estis revolucia kanto..., ĝis la franca respubliko alprenis ĝin kiel oficialan himnon...

Sed ŝajnas al mi, ke K-do P. Thorsen tenas la rekordon pri kredemo, kiam li diras, ke la burĝaroj el la tuta mondo prepariĝas por « detrui, ekstermi » Sovetion. Antaŭ ĝia aliĝo al la Ligo de Nacioj, tio povis kun iomete da ŝajna pravo esti asertata. Sed nun ? ! La diroj de Dimitrov k aliaj dungitoj de Komintern ne multe impresas min ; jam de kelkaj jaroj mi akiris la konvinkon, ke la kompartioj en ĉiuj landoj fariĝis obeemaj aparatoj en la servo de l'nacieca Stalina diplomatio. *Kies panon oni manĝas, ties agojn oni laŭdas, diras la proverbo* — kiom prave !

Mi ne povas fini ĉi tiun respondon, ne rimarkigante al K-do H. P., ke la S.F. ne havas socipolitikan programon tute pretan k kiun ĝi intencus proponi al la tuta mondo kiel panaceon. Li bonvolu legi aŭ relegi tiurilate tion, kio troviĝas sur la pĝ. 31 de nia *Manifesto*. La sennaciistoj ne havas alian pretendon ol altiri la atenton de l'proletaro al tio, ke vera socialismo, t.e. paca, bonstata k libera sociordo, ne estas starigebla nur en unu sola lando, eĉ se ĝi ampleksus la duonon de l'mondo.

En la nuna stato de l'scienco k tekniko nur mondskalaj solvoj al sociaj problemoj estas laŭcelaj. La ideologio de l'homoj malfruas kompare al tiu stato k tio konsistigas gravan, danĝeran baron. Sekve unu el la plej urĝaj taskoj estas kontraŭbatali la naciismon sub ĉiuj ĝiaj aspektoj. Tial la sennaciistoj opinias, ke esp-o estas la unua angulŝtono, kiun oni devas meti en la fundamenton de la konstruota mondordo. Kiuj malatentas tion, tiuj ne agas konsekvence, eĉ se ili pretendas paroli en la nomo de « scienca socialismo ».

Unuvorte, la sennaciistoj metas la akcenton sur la naciecan problemon k celas montri la nepran neceson vastigi mondlingvon. Nur per tia rimedo povos naskiĝi k enplantiĝi en la cerbo de l'homoj laŭcela spiritostato, ebliganta la aplikon de solvoj laŭ tutmonda skalo. Por la sennaciistoj esp-o ne estas akcesorajo, sed grava faktoro, kiun oni nepre utiligu por starigi novan mondon. Kaj la fakto, ke nia lingvo ne trovis lokon en iu kvinjara plano, estas por mi plia pruvo, ke en Sovetio la interesoj de la simplaj laboristoj estas ankaŭ tiurilate perfidataj profite al aro da poliglotoj.

E. Lanti.

∴

K-do *A. Oskam* el Roterdamo kritikas severe la artikolon aperintan en la n-o 423 : « En ĉio Naciismo » (de Bas Wels). Ni citas el lia longa skribaĵo jenajn partojn : « ... Ĉiuj, kiuj klarigis al si la faktojn k la motivojn, kiuj estis ĉe la bazo de la partopreno de la holandaj aviadistoj en la vetflugo Mildenhol-Melburno, mokridetas pri tiu artikolo. Certe la nederlanda popolo estis dum k post la vetflugo en ekstazo, eble pli ol konvenas al la flegma karaktero de la holandanoj meztipaj, k eble ĝi ankaŭ iom troigis en rilato kun la reala valoro de la afero per si mem ; la akirita rezultato tamen estis brila k laŭdinda, kiu ja indus iom da nacia fiero... Se SAT volus kritiki econ, kiel tian k ĝin deklari neunuigebla kun sia dogmo, tiam SAT laŭ mia opinio ne havus ekzisteblon, ĉar tiam ĝi neniam povus havigi al si iom da influo sur la amason, almenaŭ ne tiom longe, kiom aliaj idealoj la amason animas, k... tiam la dogmo de SAT estus superflua. »

« ... Estas sensencaĵo pensi, ke iu en Nederlando preparas militspiriton. Ke ĉiu aviadilo esence estas militaparato, ne estas tute ĝusta ; pli ĝuste B.V. skribus, ke ĉiu aviadilo pli k pli *fariĝis* militaparato. Sed jes, tio ja estas la sorto de ĉiu uzebla nova invento... La prezentmaniero de B.V., kvazaŭ la flugo de la *Ajver* estus militaviado, estas tute malkonvena. La Nederlanda K.L.M. (Reĝa Aviad-Asocio) intencas esti nur pura trafik-aviado.

« Tiaj trompaj artikoloj, kiel la ĉi tie celita, k multaj aliaj el Nederlando kaŭzas, ke multaj nederlandaj legantoj de « S-ulo » fine perdas la kredon en la fidindo de la artikoloj skribitaj ankaŭ de eksterlandanoj... »

FR. AMUNDSEN (Oslo) diras pri la

Plena Vortaro de Esperanto

2-a eldono

interalie : « Konsiderante la grandegan laboron, kiu devis antaŭi la aperigon de tia verko k la bedaŭrinde ankoraŭ limigitajn vendeblojn, oni devas diri, ke la prezo estas konfuze malalta... »

512 paĝoj dense kompostitaj. — Solida tolbindaĵo. Prezo sur la bazo de 60.— fr. fr. + rekomendita afranko. Escepta prezo por aktivaj membroj de SAT : 54.— fr. inkluzive afranko (por la persona ekzemplero).

SAT, 67, *avenue Gambetta*, *Paris* 20.

En nia movado

(Kroniko)

ĈEĤOSLOVAKIO. *Horni Bojanovice* (Moravio). — K-do Frolišek gvidas kurson kun 15 p.

DANIO. *Aarhus.* — En nia urbo (88.500 loĝantoj) la esp. movado ne tre disvastiĝis, malgraŭ pli ol 25-jara ekzisto de neŭtrala societo. La juna germ. Ĉe-instruisto Ajo en 1930 unuafoje vekis la publikan intereson. Antaŭ du jaroj fondiĝis Lab. esp. sekcio. Komunistoj k socialistoj unuece fondis la sekcion sed kiam la komunistoj rimarkis, ke ili estis malplimulto, ili forlasis la klubon, k nun laŭ la regularo ĉiuj membroj apartenas al la socialista movado (II-a Internacio).

Pasintan vintron instruis en kursoj hungarino Ica Galambos, sed ni ne multe progresis. Preskaŭ senrezulte la klubestraro sendis al ĉiuj lab. organizoj en la urbo cirkuleron propagandcelan. Ĉi-jare ni ricevis lertan Ĉe-instruiston de la dana esp. instituto (s-o A. Weide). Pri lia sukcesa laboro legu la rap. en la antaŭa « S-ulo ». En nia ekspozicio (lastdecembre) estis ankaŭ videbla grandega SAT-emblemo ; ekster la domo flirtis la ruĝ-verda standardo. Granda reklamelpendaĵo elvokis la scivolon de la promenantoj. La plej efika reklamilo konsistis el tri k duonan metrojn alta propagand-kolono, kiu laŭ permeso de la urbestraro k polico, estis starigita meze de la granda placo antaŭ la stacidomo, videbla de tri stratoj. 25.000 flugfolioj estis disvastigataj en Aarhus k la tri antaŭurboj.

La sinteno de la lab. gazeto « Demokraten » estis valora. Ĉe la malfermo alvenis ĵurnalisto, kiu ricevinte klarigojn en la ekspoziciejo (Hotelo « La Espero ») bone raportis pri la afero. Sekve de tiu reklamado en la du plej grandaj taggazetoj (unu burĝa, unu laborista) aperis grandaj artikoloj pri esp-o k la unua leciono de kurso por komencantoj, kiu daŭros dum 20 dimanĉoj. Oni devas konsideri, ke tiuj gazetoj estas legataj de preskaŭ ĉiuj personoj en la urbo k la antaŭurboj. Multaj vizitis la ekspozicion, k ĉe la fino okazis Zamenhof-festo en salonego de la laborista kunvendomo. (Parolinto : A. Weidę). En januaro komenciĝis novaj kursoj (unu daŭriga kurso gvidata laŭ « Petro »). — *R. J.*

FRANCIO. *Parizo.* — La 1-an de januaro la Grupo de FEO organizis bankedon konsistantan el simpla vegetara manĝaĵo kuirita de grupaninoj, en Junulara gastejo ekster Parizo ; ĝin partoprenis 24 p. Poste okazis parolado de K-do H. P., ludoj, kantado ktp. Estas intencite organizi tian komun-manĝadon ĉiumonate.

NEDERLANDO. *Zaandam.* — Sep kursoj de profesia esp. instruisto Brukenberg (en 5 lokoj) kun sume 220 p. (inter ili 70 geknaboj).

SVEDIO. *Malmö.* — La SAT-rondo kunvenis dum la pasinta jaro regule ĉiun monaton. En ĉiu kunveno unu el la Gek-doj faris paroladon, kiun sekvis diskuto. Tiu aranĝo estis laŭ nia konkludo tre bona en la unua periodo de aktiveco, ĉar per tio la rondanoj spertiĝis en la uzado de la lingvo. Ĉiuj anoj laŭvice prezidis k protokolis. — Ni opinias nun la tempon matura por pli pozitiva agado. Tiucele ni komencis organizi informservon utilige al sindikatoj. Sed, bedaŭrinde, ŝajnas, ke kompreno sufiĉa tiaflanke mankas ĉe la tutmonda anaro. Ĉu la aparato ne funkcias, aŭ mankas sistemeco ? Nia rondo estonte pritraktos tiun aferon k kredeble aperigos pozitivan proponon. Mondsolidare *E. Norman* (13 132).

DEK STUDANTAJ GEJUNULOJ, apartenantaj al la soc.-dem.-junular-movado, ĉiuj komencantoj, deziras korespondadi. Al ĉiu korespondanto ni respondos. Adreso : *E. Nyrell*, S. J. Bostadshus. *Hessleholm* (Svedio).

Memornoto

PRIESPER. ARTIK. K NOTOJN ENHAVIS : *Arbetaren*, Stokh., 31.12. ; *Signalen* Stokh., 13.12., 3.1. ; *Suomen Socialdemokraatti*, Helsinki, 4.11., 2.12. (kurso, pri SAT), informoj en esp. ; *Nepszava*, Budap., 15.12. ; *De Fakkel*, Amsterd., 18.12., 8.1. ; *Demokraten*, Aarhus, 9.12. (kun bildoj).

PRI SAT RAPORTIS : *Utopian News*, Los Angeles, 13.12. ; *Suomen Socialdem.* Helsinki, 7.10. (Kongreso).

NIA POŜTO

Jovado. — Via informo jam entenas nenion esence novan pri la temo, kiu jam sufiĉe estas pritraktita en antaŭaj n-roj de nia space tre limigita gazeto.

Tri esp. kluboj, 70 anoj, komenc. k progresintoj, dez. kor. kolekt. k individue per PK k L kun Gek-doj ĉiulandaj. Unufoja resp. garantiata. Skribu multnombre al Elog Olsson, Fredsg. 43, *Katrineholm*, Svedio.

Recenzejo

ROLLET DE L'ISLE : L'INITIATION A L'ESPERANTO. 2-a eldono. 1934. Belga Esperanto-Instituto, 11, rue du Petit-Chien, *Antverpeno*. 78 p. Form. 13×21. Prezo neindikita.

Propaganda broŝuro franclingva kun multaj detaloj pri organizo k historio de la esp. movado. La apero de dua eldono montras ĝian valoron.

E. K. DREZEN : NORMIGO DE SCIENCE-TEKNIKAJ KONCEPTOJ, TERMINOJ K SIMBOLOJ. 108 pĝ. Form. 12×19. Vol. 5 de Biblioteko de Tutsovetia Normig-Komitato. adr. ul. Razina 12, *Moskvo* 12. Prezo : 2 rbl. Ruslingva kun 3-paĝa resumaĵo en esp-o.

Radio Hilversum !

Dissendoj en k pri esp-o okazos de stacio *Hilversum* (ondo 1.875 m), je 19.10-19.30 horo (parolonto : K-do F. Faulhaber) prezid. F.L.E., je la

2.II. pri celo de la radio-elsendoj ;

16.II. lingva prelego ;

2.III. pri la esp. movado.

16.III. por la infanoj ;

30.III. por la virinoj ;

13.IV. Memorigo pri morto de Zamenhof ;

27.IV. Rerigardo de la Federacia Kongreso (okazonta 20/21.IV.).

La dissendoj okazas dank'al Laborista Radio-Asocio « Vara », Postbus 50, *Hilversum*, Nederl., al kiu oni skribu post aŭskultado instigajn vortojn, petante daŭrigon !

Diskonigu k abonigu

Sennacieca Revuo-n

la 16-paĝan ĉiumonatan ilustritan socipolitikan k literaturan gazeton de SAT.

El la enhavo de la januara n-ro : Leteroj el Meksikio, Jugoslavio, Svedio, kc. Mond-Ekonomio. Diskutejo. — Hungara, dana, sveda laborist-tendenca literaturo. Ĉina filozofio. Ktp, kc.

SAT, 67, *avenue Gambetta*, *Paris* 20.

Korespondado

AŬSTRIO.

Kongrespartoprenonto deziras kor. kun francaj K-doj. *K. Gehmayer*, instruisto, Genossenschaft 7, *Attnang*.

ĈEĤOSLOVAKIO.

Esp. grupo dez. interŝanĝi L., PK., PM., kĉl. Certe respondas ! K-doj pruvu utilecon de esp. koresp. Skribu al K-do *Jozef Stankuš*, *Poruba* u Olrové 83, Slezsko-Teŝ.

Juna esp-isto dez. kor. kun eksterl. Gek-doj. Certe resp. *Willi Richter*, Zel. pluk. 1 zel prov. rota, *Pardubice*.

FRANCIO.

Kvar sudfranciaj instruistinoj dez. kor. kun Gek-doj. Skribu al : *Lentaigne*, *Villeveyrac*, Hérault.

Laval. — SAT-ano 18 983, 5, av. Eugène Courel, *Champigny*, petas pri nuna adreso de K-do Marcel Urbain, antaŭe en La Varenne.

NEDERLANDO.

F. L. E.-Sekcio Roterdamo 5 serĉas korespondantojn kĉl. pĉt. Resp. garantiata. Skribu al K-do *Th. Morel*, Hillestr. 39a, *Rotterdam-Zuid*.

Ni bezonas por nia Ekspozicio ĉian materialon (gazetoj, prospektoj k ĉiaj esp.-aĵoj). Unufojan resp. ni garantias. F.L.E.-Sekcio Roterdamo 5. Sendu al K-do *C. v. Essen*, Westerbeekstr. 80, *Rotterdam-Zuid*.

18-jara K-do *G. J. van Dam*, Kastanjestr. 43, *Chevremont-Kerkrade*, dez. kor. kun Gek-doj el diversaj landoj.

PORTUGALIO.

K-do D-ro *Jorge Sanches de Castro e Santos*, R. do Bonfim 76, 1°, *Porto*, dez. kor. kun Gek-doj, precipe junaj, ĉiul., speciale kun Meksikio k Turkio k ankau kun Sovetio (tra Francia adreso).

SVEDIO.

Esp. kurso dez. koresp. kĉl. K-doj pri ĉ. t. Adreso : *Erik Sörqvist*, Kocksgatan 41 n. b. ö. g. Stockholm.

NEKROLOGO

Per ĉi tio ni plenumas la malgajan komision, sciigi al la SAT-anaro, ke la senindulga morto forprenis el niaj vicoj

K-don B. M. EERDMANS.

SAT-ano n-o 17375

Kun li foriris vera K-do esperantista, kiu ĉiam fidela al la deziro Zamenhofa staris aktive en la esperanta movado.

La Roterdama Distrikto de la Nederlanda L.E.A. ne nur perdis bonan anon, sed ankaŭ modelulon por la movado ĝenerale, al kiu li verve dediĉis sian tutan liberan tempon.

Materie li disiĝis de ni, sed spirite li ĉiam restos inter ni.

Distrikta Estraro.

Le Gérant : L. GLODEAU.

PRES. GRANCHAMP, ANNEMASSE — 38-1-35.